

ADEPTOJ DE SATANO EKMOVIĜIS

Pri la eventoj, kiel estas la sekvaj, oni en amaskomunikiloj nur malofte parolas. Ankaŭ tiujn aferojn estas necese vidi – sen ilin trotaksi – por ke ni hodiaŭ ne fordonu sin al naiva konfideco. La sekvajn faktojn publikigis revuo Famille Chrétienne la 20.7.2007.

En dokumento „Satanismo kaj sektismaj erarvoj“, kiun publikigis interministeria laborgrupo por observado de la sektismaj societoj, estas interreto indikita kiel loko, sur kiu satanismo grupigas siajn adeptojn. „Satanistoj preferas personajn kontaktojn eluzante la eblecon, kiun al ili disponigas anonimeco de la rilatoj en la interreto,“ raportas la dokumento.

Tio okazis al Baptist. Danke al Dio sen plujaj sekvoj. Dum interparolo kroĉis sin al li iu satanisto. Li proponis, ke li partoprenu nigran meson. Ili interkonsentis renkontiĝon. Sekvis horoj da interparoloj pri la homaj aferoj dum la nigraj mesoj... Baptist fine volis havi nenion komunan kun ĉi tio: „Mi tre ektimegis...“

„La interreto montriĝas kiel bona ilo por ekligi diskretan kontakton, disvastigi diversajn informojn, sen tio, ke pri tio eksciui iu respondeculo, aŭ la gepatroj.“

El la virtuala mondo poste estas nur la paŝo en la mondon realan. Ekde la jaro 2005 grave kreskis en Francio aktivadoj de la satanistoj. Estis registritaj 214 difektitaj objektoj, je 60 % pli ol dum antaŭa periodo, kaj plejparte ilin realigis junaj homoj influitaj per satanismo.


La jaro 2006 konfirmis tiun tendencon. En Bretonio estis bruligitaj kelkaj preĝejoj, ekz. en Saint Tugdual. En Rosporden estis detruita krucovojo, en Saint Thuriën ruinigita tombejo. Ĉiam tie aperis signo 666, pentrita sur la ŝtonoj, faligitaj krucoj, kio klare montras al la satanismo.

En la nokto el la 11-a je la 12-a de aprilo 2006 estis detruitaj 77 tomboj sur la tombejo en Léhon. La krucoj estis renversitaj kaj tiel starigitaj. „Neniam ni devis en nia civito plendi pro rasismaj faroj. Neniu fremdlاندano estas ĉi tie entombigita. Ni staras antaŭ

la enigmo: Kial tio? Por kio? Ĝi aspektas kiel rituala agado,“ plendas la loka vilaĝestro de tiu malgranda civito.

Preskaŭ la sama scenaro okazis en Mensil-sur-Oger. La 30-an de aprilo, en la tago de fondo de la satanista sekto, estis detruita loka tombejo. Mallonge post tio estis arestitaj du viroj en la aĝo de 24 kaj 43 jaroj. Ili estis satanistoj, kiuj konfesis, ke ili agis kadre de ritualaj aktoj.

La mondo de kulturo siamaniere kontribuas al tio. Februare 2006 en libroeldonejo „Camion Noir“ (Nigra kamiono) ĉe la „eldonisto, kiu transportadas sulfuron“, aperis franca eldono de „Satana Biblio“. Ĝia aŭtoro, antaŭ nelonge mortinta Anton Szandor la Vey, estas fondinto de la Satana eklezio en San Francisco. Ekde ĝia eldono en la jaro 1969 estis enmonde disvastigitaj 600 000 ekzempleroj de tiu ĉi libro. La eldonisto rifuzas malkaŝi ĝian eldonkvanton en Francio. „Ekzistas multaj miloj da ili, ĉar ĝi estas titolo, kiu estas bone vendata...“, rimarkas Sébastien Raizer, unu el fondintoj de Camion Noir kaj tradukinto de la libro.



Anton Szandor la Vey

La satanismo ne adresas parolon nur al la junaj, sed ankaŭ al pli aĝaj homoj. Ili praktikas siajn proprajn ceremoniojn, ekz. en Parizo sur la tombejo Pèr Lachaise. El ĉiuj landoj de Eŭropa Unio Francio estas sur la unua loko en nombro de noktaj vizitoj en tombejoj. Multmiloj da tomboj estis difektitaj. Por siaj ritualoj la satanistoj elfosas infan-

najn kadavrojn. Estis elŝtelitaj ankaŭ kelkcentoj da tabernakloj. La ŝtelitaj hostioj estas ofertataj per interreto grandpreze – por nigraj mesoj.

Ĉefepiskopo de Avignon Mons. Cattenoz informas, ke li ne sukcesas kalkuli difek-

titajn preĝejojn: „Mi alvokas ĉiujn ŝtatajn ordotenajn instancojn, ke ili faru ĉion, kio estas en ilia ebleco, ke ili esploru tiun maldecan aktivadon en nia socio. Ni volus en ĝi ankoraŭ renovigi respekton por nia religia vivo.“ ■

El Vision 2000 – 2/2008